OKTOBRO

LA SUNO HISPANA

BARCELONO 5ª - 11ª SEPTEMBRO



1909

LA SUNO HISPANA

Direktoro-Administranto ★ Director-Administrador

Augusto Jimenez Loira

PINTOR LÓPEZ, 3 = VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

JARO VI

N.º 70

OKTOBRO 1909

ENHAVO





Nia fotogravurajo

Sur nian lastan Junian numeron, ni enpresis leteron de Sinjoroj Barono de Menil kaj Bourlet, al Sinjoro Komandanto Huecas kaj al liaj afablaj gesamideanoj en Gerona'o, dankante la akcepton, kiu ilin ricevis en tiea stacidomo, kiam ili veturis el Parizo en Barcelonon.

Tiam, dekjara kaj okjara infaninoj Karmeno kaj Mario-Terezo, filinetoj de S-ro Huecas, kies portretoj ni vidigas, sub flago de la Gerona Esperantista Grupo, prezentis al la veturantoj garbojn da floroj kaj per korekta esperanto ilin alparolis:

«Amegataj sinjoroj:

Ni ne ankoraŭ bone elparolas Esperanton; sed, se vi atente nin aŭskultos, vi komprenos, ke ni estas la ilo, per kiu la Gerona Esperantistaro montras al vi sian sinceran amikecon, sian veran fratecon, sian grandan amon; kaj ĝianome ni tre kore petas, akceptu ĉi-tiujn bukedojn, kiel donacion al vi, kaj al nia kara Majstro.

Permesu, ke ni aldonu fortajn kaj korajn kisojn, kiujn vi transdonos al nia ĉiam amata Majstro.

Vivu Esperanto! Vivu nia Majstro!»

Nuestro fotograbado

En nuestro número de Junio último insertamos una carta de los Sres. Barón de Menil y Bourlet al Sr. Comandante Huecas y á los amables *samideanos* y *samideanas* de este señor en Gerona, agradeciendo el recibimiento de que fueron objeto en aquella estación en ocasión del viaje de París á Barcelona.

Entonces, unas niñas de diez y de ocho años, Carmen y María-Teresa, hijitas del Sr. Huecas, cuyos retratos exponemos bajo la bandera del Grupo Esperantista de Gerona, ofrecieron á los viaviajeros ramos de flores, y en correcto esperanto les dijeron:

«Amadísimos señores:

Nosotras todavía no hablamos bien el Esperanto; pero si ustedes nos escuchan con atención, comprenderán que somos el instrumento, por el cual los esperantistas de Gerona muestran á ustedes su sincera amistad, su verdadera fraternidad, su gran amor; y en nombre de ellos, nosotras pedimos á ustedes muy cariñosamente, que acepten estos ramos de flores como regalo á ustedes y á nuestro querido Maestro.

Permitidnos que añadamos sonoros y cariñosos besos, que ustedes transmitirán á nuestro siempre querido Maestro.

¡Viva el Esperanto! ¡Viva nuestro Maestro!»

Va Kongreso

La 4an de Septembro, sabaton, antaŭtagon de la oficiala akcepto de D-ro Zamenhof, li jam tie estis kun sia fremda sekvantaro, kaj ankaŭ al Barcelona'o alvenis, per sama kaj aliaj vojoj, ne hispanaj, kaj hispanaj esperantistoj el la ceteraj hispanaj regionoj.

De tiu momento pliigis la ĉiam movadon kaj gajecon en tiu urbo, kaj tra la placoj kaj stratoj, en la kafejoj, en la teatroj, en la kinematografoj, ĉie, oni vidas geesperantistoj, kiuj ĝoje babilas mon-

V Congreso

El 4 de Septiembre, sábado, víspera de la recepción oficial del Dr. Zamenhof, ya estaba él allí con su comitiva, y también á Barcelona habían llegado por el mismo y otros caminos, esperantistas no españoles, y españoles de las demás regiones españolas.

Desde aquel momento aumentó el movimiento y alegría de siempre en aquella ciudad, y en las plazas, en las calles, en los cafés, en los teatros, en todas partes se veaín esperantistas de ambos sexos

trante la taŭgecon de nia lingvo kaj decidante multajn lerni ĝin.

Je la kvina vespera horo, Doktoro Zamenhof vizitis la Urbestraron, la Provincan Deputataron, la Generalestro kaj Civila Provincestro. Li estis akompanata de la Loka Komitato de la Kongreso, la Konstanta Komitato, kaj de Akademianoj. La sekvantaro okupis kvar veturilojn antaŭiratajn de rajdantaj urbaj gardoj.

Lia Moŝto sinjoro Urbestro ĝentile parolis nian karan Majstron, konstatigante la grandan honoron por Barcelono akcepti lin kaj la ceterajn esperantistojn. Doktoro respondis danke en lia nomo kaj en nomo de la esperantistaro, pro la kora akcepto de Barcelona'o.

Simile okazis la akceptoj ĉe la aliaj aŭtoritatoj, kaj dum la vizitoj, S-ro Pujulá faris lerte la prezentadojn, kaj la tradukojn de la paroladoj.

La urbestrejon kaj la palacon de la Provinca Deputataro, famajn konstruaĵojn, kiuj estas kaj enhavas belajn artaĵojn, estis rigarditaj kaj tre laŭditaj de la kleraj vizitantoj.

Dum la trastratado de S-ro Zamenhof, li estis respektplene salutata de la plimulto el la trairantoj, kaj tiel li, kiel ĉiuj la esperantistoj, sin montris kontentaj de la gastema Barcelona akcepto.

Vespere, S-ro Joao Keatin, faris belan paroladon pri Brazilujo en la Barcelona Ateneo, kun ĉeesto de S-ro Mudie, kiu prezentis la parolonton, kaj aliaj multaj esperantistoj. La festo finiĝis per gustado de taso da bonega Brazila kafo.

Dimanĉon

Frumatene komencis la esperanta vivo. Tapetoj, kaj esperantistaj flagoj ornamas multajn balkonojn. La alvenintaj esperantistoj promenas tra la urbo, kaj el la alvenantaj vagonaroj kaj vaporŝipoj, eniras en la gastejojn aliajn kaj aliajn gesamideanojn.

que alegremente charlaban demostrando la utilidad de nuestro idioma y decidiendo á muchos á aprenderlo.

A las cinco de la tarde, el Dr. Zamenhof visitó al Ayuntamiento, á la Diputación Provincial, al Capitán general y al Gobernador Civil. Le acompañaban el Comité Local del Congreso, el Comité Constante y los académicos. La comitiva ocupó cuatro carruajes, precedidos de municipales á caballo.

El Excmo. Sr. Alcalde atentamente habló á nuestro querido Maestro, haciendo constar el gran honor para Barcelona de recibir á él y á los demás esperantistas. El Doctor contestó agradecidamente en su nombre y en el de los esperantistas por el cariñoso recibimiento de Barcelona.

Símilmente se verificaron los recibimientos de las otras autoridades, y durante las visitas el Sr. Pujulá hizo hábilmente las presentaciones y las traducciones de los discursos.

La Casa Ayuntamiento y el palacio de la Diputación Provincial, famosas construcciones que son y contienen objetos artísticos, fueron contemplados y muy alabados por los ilustrados visitantes.

Mientras recorrió las calles el señor Zamenhof, fué con el mayor respeto saludado por los viandantes, y tanto él como todos los esperantistas se mostraban satisfechos del hospitalario recibimiento de Barcelona.

Por la tarde, el Sr. Joao Keatin hizo un bello discurso concerniente al Brasil en el Ateneo de Barcelona, con asistencia del Sr. Mudie, que presentó al orador, y otros muchos esperantistas. La fiesta terminó saboreándose una taza de magnífico café del Brasil.

Domingo

Muy de mañana empezó la esperanta vida. Tapices y banderas esperantistas adornaban muchos balcones. Los esperantistas de ambos sexos que habían llegado paseaban la ciudad, y de los trenes y vapores que iban llegando, entraban en los hospedajes otros y otros *samideanos* y *samideanas*.

La kristanaj kongresistoj praktikis siajn religiajn devojn ĉe la Preĝejo de la Bonfarada Domo, kie predikis patro Richarson kaj benis la katolikajn esperantistojn je la nomo de Lia Moŝto Papo, kaj ĉe la evangelia kapelo kun prediko de pastro Rust.

En la korto de la Azilo, post la Meso okazinta en ĝia Preĝejo, la geinfanoj tie loĝitaj, pli ol cent kvin dek, evoluciis, ludis gimnastikon kaj kantis, inter aliaj kantaĵoj, «La Espero»n, kiu estis aplaŭdegita.

Je la oka horo estis komencita la alvenon de la geesperantistoj al Palaco de Belaj Artoj. Ĝi koincidis kun la ĉeesto tie de la Studentaj Kolonioj, kiuj revenas de sia somera ekskurso, kaj tio faris pli gaja kaj brua nian ĉeeston.

La urba muzikistaro ludadis belajn muzikaĵojn.

La galerioj de la Centra Navo de la konstruaĵo estis ornamitaj per tapetoj kaj per flagoj, fremdaj, naciaj, kaj esperantistaj.

Je la naŭa matene oni malfermis la akceptejon lokitan en teretaĵo de la palaco, kaj en ĝi eniris preskaŭ ĉiuj la ĉeestantoj geesperantistoj por sin informi laŭbezone kaj preni korespondadon.

Je la dekunua kaj kvarono, alvenis Palacon Doktoro Zamenhof akompanita de sia distinginda edzino kaj de S-roj Bourlet, Mibs, Boirac, Sebert, Pujulá kaj de aliaj famaj fremdaj kaj hispanaj esperantistoj.

Bruegaj aplaŭdadoj salutis la alvenon de tiuj ĉi sinjoroj, dum ili transigis al la salono nomita Reginta Reĝino.

Tie, doktoro donis la bonvenon al la kongresanoj, laŭdis la barcelonanojn kaj panegirfaris la esperanton.

Liaj vortoj estis entuziasme akceptataj.

Poste li kaj sia sekvantaro transigis al la Centra Navo. La urba muzikistaro ludis nian himnon «La Espero» kiun kantis la geesperantistoj, kaj la publiko freneze ilin aplaŭdis.

La Doktoro kaj la sinjoroj de la komitato salutis la urbestron kaj la urbestraron.

Los Congresistas cristianos practicaron sus deberes religiosos en la iglesia de la Casa de Beneficencia, donde predicó el P. Richarson, y bendijo á los católicos esperantistas en nombre de Su Santidad, y en la Capilla evangélica con sermón del Pastor Rust.

En el patio del Asilo, después de la Misa que se dijo en su iglesia, las niñas y niños, allí albergados, más de ciento cincuenta, evolucionaron, hicieron gimnasia y cantaron, entre otras piezas, «La Espero», que fué aplaudidísima.

A las ocho había empezado la llegada de los esperantistas al Palacio de Bellas Artes. Coincidió con la presencia allí de las Colonias Escolares, que volvían de su excursión veraniega, y ello hizo más alegre y ruidosa nuestra fiesta.

La música del Ayuntamiento tocó bellas composiciones.

Las galerías de la Nave Central del edificio estaban adornadas con tapices y con banderas extranjeras, nacionales y esperantistas.

A las nueve de la mañana se abrió el local de recepciones, instalado en el piso bajo de palacio, y en él entraron casi todos los esperantistas allí presentes para informarse de lo que les convenía y recibir correspondencia.

A las once y cuarto llegó al Palacio el Dr. Zamenhof, acompañado de su distinguida esposa y de los Sres. Bourlet, Mibs, Boirac, Sébert, Pujulá y otros famosos esperantistas extranjeros y españoles.

Ruidosísimos aplausos saludaron la llegada de estos señores, mientras se dirigían al Salón llamado Reina Regente.

Allí el Doctor dió la bienvenida á los congresistas, alabó á los barceloneses y preconizó el esperanto.

Sus palabras fueron recibidas con entusiasmo.

Después, él y su séquito se trasladaron á la Nave Central. La música del Ayuntamiento tocó nuestro himno «La Espero», que cantaron los esperantistas, aplaudiéndolos el público frenéticamente.

El Doctor y los señores del Comité saludaron al alcalde y á los concejales.

S-ro urbestro Layret kaj urba konsilanto S-ro Fuster parolas al la studentetoj.

Tuj, Doctoro Zamenhof laŭdis la koloniajn instituciojn, salutante la morgaŭajn homojn, kiuj scios kompreni kaj disvastigi la esperantan lingvon, tiel fratigante ĉiujn terpopolojn.

Vivu'oj al Doktoro Zamenhof kaj al esperanto estingis liajn lastajn vortojn.

Tagmeze okazis la inaŭguracio de arta Ekspozicio organizita de «Esperantista Vagabonda Klubo» en Salono *Parés*.

S-ro Chavet, sekretario de Pariza Grupo, malfermis la Ekspozicion per paroladeto, al kiu respondis Doktoro Zamenhof.

Posttagmeze oni ludis *pied-pilkon*; tiun feston prezidis D-ro Zamenhof, kun ĉeesto de multaj geesperantistoj.

Belaj muzikaĵoj estis luditaj de la Muzikistaro de la Ruĝa Kruco, inter ili, ripetite, «La Espero».

Je la deka vespera horo okazis koncerto, por la honoro de la kongresistoj, en teatro nomita *Romea*. Verkoj de Charpentier, Bayle, Gounod, Suñer, Onia, Fargas, Le Boux, de Menil, Deutsch, de la Meurthe y Gluck estis kantitaj de fraŭlinoj Marta Prevost, Onia, Fargas, Mario Brucker, Decourt, Henkel kaj S ro Masip, geesperantistoj, kun granda ĉeestantaro, en kiu sufiĉegis *bela* belsekso.

D-ro Zamenhof ĉeestis kun sia edzino kaj estis ovaciita.

Lundon

Barcelono estas esperantigita; sufiĉegas esperantistaj flagoj en vendejoj, balkonoj, kafejoj, tramvojoj, k. t. p.; ĉie, oni laŭtpublikigas esperantistajn gazetojn; ĉie oni kantas aŭ ludas nian himnon «La Espero».

Frumatene komencis la alveno de geesperantistoj, al la Palaco de Belaj Artoj, inter kiuj, multaj kaj belaj esperantistinoj.

Ĝia majesta salono estis arte ornamita. En la centro estas starigita vasta tribuno difinita por la prezidantaro por la komitato, kaj por la fremdaj Delegitoj.

El Sr. Layret, alcalde, y el Sr. Fuster, concejal, hablaron á los estudiantes.

Seguidamente, el Doctor Zamenhof alabó las instituciones coloniales, saludando á los hombres de mañana, que sabrán entender y difundir el idioma Esperanto, haciendo de ese modo fraternizar á todos los pueblos de la tierra.

Vivas al Doctor Zamenhof y al esperanto ahogaron sus últimas palabras.

Al mediodía se verificó la inauguración de una Exposición Artística organizada por el «Club Esperantista Vagabundo», en el Salón *Parés*.

El Sr. Chavet, secretario del Grupo de París, abrió la Exposición con un discursito, al cual contestó el Dr. Zamenhof.

Por la tarde se jugó un *foot-ball*, fiesta que presidió el Doctor Zamenhof, con asistencia de muchos esperantistas.

Hermosas composiciones musicales fueron tocadas por la Banda de la Cruz Roja, entre ellas, repetidamente, «La Espero».

A las diez de la noche se verificó un concierto en honor de los Congresistas en el teatro de *Romea*. Composiciones de Charpentier, Bayle, Gounod, Suñer, Onia, Fargas, Le Roux, de Menil; Deutsch, de la Meurthe, y Gluck, fueron cantadas por las Srtas. Marta Prevost, Onia, Fargas, María, Brucker, Decourt, Henkel y señor Masip, esperantistas, con gran concurrencia, en la que abundaba *bello*, bello sexo.

El Dr. Zamenhof asistió con su señora y fué ovacionado.

Lunes

Barcelona está esperantizada; abundan banderas esperantistas en las tiendas, balcones, cafés, tranvías, etc.; por todas partes se pregonan periódicos esperantistas; por todas partes se canta ó se toca nuestro himno «La Espero».

De buena mañana empezó la llegada al Palacio de Bellas Artes de los esperantistas, entre los cuales había muchas y bellas esperantistas.

Su majestuoso salón estaba artísticamente adornado. En el centro había levantada espaciosa tribuna designada para la presidencia, para el Comité y para los

Malantaŭen el la tablo, oni vidas la verdan standardon kaj busto de la genia elpensinto de esperanto.

Kvarono de la dekunua horo, eniras Doktoro kun lia sekvantaro; kaj la esperantistaro kaj la publiko, lin salutas per eksterordinara ovacio. Li okupis la prezidantan seĝegon; dekstre sidiĝas urbestro S-ro Layret, kaj en aliaj lokoj, apud la tablo, S-roj Pujulá, Bourlet, Mibs, Sabadell, kaj Perogordo. Estas gesekretarioj S-ino Rebours de Pujula kaj S-ro Chavet.

S-ro Mibs, prezidanto de la kvara Kongreso okazinta en Dresdeno la pasintan jaron, post saluta paroladeto, cedis la prezidon al S-ro Pujulá.

D-ro Zamenhof, per mallonga parolado, dankas la Reĝon, la ministrojn, la Barcelonan urbon kaj la Barcelonan urbestraron, en sia nomo kaj en nomo de la esperantistoj, pro la protekto donita al Esperanto.

Ankaŭ parolis S-ro Pujulá, kaj S-ro Chavet sciigante, ke Belga registaro sendis por ĝin riprezenti en la Kongreso al S-roj Van der Biest kaj Oscar Van Choor, tiu de Norvegujo al S-ro Schibie, kaj tiu de Usono al S-roj Harris kaj Edvard Reed.

La urbestro, per Katalunja lingvo, salutis la Kongreson kaj konstatigis la grandan ĝojon ke Barcelono sentas esti gastejo de la esperantismo. S-ro Bremón tradukis tiun paroladon, kiu estis tre aplaŭdita.

Laŭ propono de S-ro Zamenhof, oni salutis telegrafe liajn Moŝtojn, Hispanan Reĝon, Reĝidon Don Karolo, Ministraron, kaj S-ro Codorniu.

La delegitoj parolis je la nomo de siaj reprezentitaj, nome: el tiuj de Usono, S-ro Rood.

Bohemujo, S-ro Represt.
Brazilo, S-ro Keating.
Anglujo, S-ro Mudie,
Gibraltaro, S-ro Edwart.
Skotlando, S-ro Lutz.
Danujo, S-ro Pinck.
Finlando, S-ro Frenckel.
Francujo, S-ro Decourt.
Kastila lingvo, S-ro Perogordo.
Valencia Urbestraro, S ro Aguilar.

delegados extranjeros. Detrás de la mesa se veía la bandera verde y el busto del genial inventor del esperanto.

A las doce y tres cuartos entra el Doctor con su séquito; y los esperantistas y el público le saludan con extraordinaria ovación. Ocupa el sillón presidencial; á su derecha se sienta el alcalde señor Layret, y en otros sitios de la mesa, los señores Pujulá, Bourlet, Mibs, Sabadell y Perogordo. Son secretarios la Sra. Rebours de Pujulá y el Sr. Chavet.

El Sr. Mibs, presidente del Cuarto Congreso verificado en Dresde el año pasado, después de un discursito de salutación, cedió la presidencia al Sr. Pujulá.

El Dr. Zamenhof, en corto discurso, da gracias al Rey, á los ministros, á la ciudad de Barcelona y al Ayuntamiento de Barcelona, en su nombre y en nombre de los esperantistas, por la protección que han dado al esperanto.

También habló el Sr. Pujulá y el señor Chavet, manifestando que el Gobierno belga había enviado para representarlo en el Congreso al Sr. Van der Biest y Oscar Van Choor; el de Noruega al señor Schibie y el de los Estados Unidos á los Sres. Harris y Eduardo Reed.

El alcalde, en catalán, saludó al Congreso, é hizo constar la gran alegría que siente Barcelona en hospedar al esperantismo. El Sr. Bremón tradujo ese discurso, que fué muy aplaudido.

A propuesta del Sr. Zamenhof se dirigieron telegramas de salutación á S. M. el Rey de España, S. A. el Príncipe don Carlos, al Ministerio y al Sr. Codorníu.

Los delegados hablaron en nombre de sus representados, á saber: de los de los Estados Unidos de América, Sr. Rood.

Bohemia, Sr. Represt.
Brasil, Sr. Keating.
Inglaterra, Sr. Mudie.
Gibraltar, Sr. Edwart.
Escocia, Sr. Lutz
Dinamarca, Sr. Pinck.
Finlandia, Sr. Frenckel.
Francia, Sr. Decourt.
Lengua castellana, Sr. Perogordo.
Ayuntamiento de Valencia, Sr. Aguilar.

Vaskonia lingvo, S-ro Allende.
Astura lingvo, S-ro Fraga.
Katalunja lingvo, S-ro Bremon.
Germanujo, S-ro Arnold.
Holandujo, S-ro Wermans.
Hungarujo, S-ro Marich.
Italujo, S-ro Tellini
Polonio, S-ro Grabowski.
Rusujo, S-ro Orwstrowsky.
Kaŭkaso, S-ro Ciclaris.
Samoa'o, S-ro Stamitiades.
Svisujo, S-ro Privat.
Irlanduĵo, S-ro Parker, k. t. p.

Oni legis la multajn ricevitajn aliĝojn.

Paroladoj de D-ro Zamenhoj kaj de S-ro Pujulá malfermas la kunsidon, kaj dum la unua, piede la ĉeestantaro, oni dediĉas rememoron al fraŭlino Schroder, kiu mortis en Svisujo dum sia vojaĝo al la Kongreso.

Kvarono antaŭ la unua horo finiĝis la matena kunveno.

Je dudek minutoj de la kvara horo daŭrigis la kunsido. La ĉeestantaro estis tiel multenombra, kiel matene.

Parolis S-ro Schwar reprezentanto de la Bosnioj kaj Herzegovinoj, kaj tiu de Dalmacioj.

S-ro Richardson reprezentanto de la Franca Federacio de Industrio kaj komerco, pri ĝia disvastiĝo.

Pri komerca propagando kaj pri Banko Esperantista Organizita de S-ro Ĉefeĉ, S-roj Mann kaj Blaisse.

S-ro Cart pri konitaj esperantaj ŝlosiloj.

S-roj Allende kaj Privat, pri la propagando de gazetoj.

S-ro Sekretario legis leteron de Centra Oficejo rilate al insignioj por koni la naciecon.

Je la kvina horo finiĝis la unua kunsido.

La Esperantista klubo arанĝis muzikan-teatran kunvenon en teatro *Romea*, kun ĉeesto de D-ro Zamenhof, kaj la plimulto de la kongresanoj, kelkaj kun naciaj kostumoj. Oni faris bonan muzikon, kaj S-ro Urbes deklamis esperantan monologon de S-ro Pujulá. Cio estis aplaŭdegita.

Lengua vascongada, Sr. Allende.
Lengua asturiana, Sr. Fraga.
Lengua catalana, Sr. Bremón.
Alemania, Sr. Arnold.
Holanda, Sr. Wermans.
Hungría, Sr. Marich.
Italia, Sr. Tellini.
Polonia, Sr. Grabowski.
Rusia, Sr. Orowstrowsky.
Cáucaso, Sr. Ciclaris.
Samoa, Sr. Stamitiades.
Suiza, Sr. Privat.
Irlanda, Sr. Parker, etc.

Se leyeron las muchas adhesiones recibidas.

Discursos del Dr. Zamenhof y del señor Pujulá cierran la sesión, y durante el primero, con el auditorio de pie, se dedicó un recuerdo á la Srta. Schroder, que murió en Suiza durante su viaje al Congreso.

A las doce y tres cuartos terminó la reunión de por la mañana.

A las tres y veinte minutos continuó la sesión. Los asistentes fueron tan numerosos como por la mañana.

Habló el Sr. Schwar, representante de los Bosnios y Herzegovinos, y el de los de Dalmacia.

El Sr. Richardson, representante de la Federación de la Industria y el Comercio, franceses, por su difusión.

Respecto á propaganda comercial y respecto al Banco Esperantista organizado por el Sr. Ĉefeĉ, los Sres. Mann y Blaisse.

El Sr. Cart, de las conocidas claves de Esperanto.

Los Sres. Allende y Privat, de propagación de periódicos.

El señor secretario leyó una carta de la Oficina Central, referente á insignias para conocer la nacionalidad.

A las cinco terminó la primera sesión.

El Club Esperantista organizó una reunión músico-teatral en el teatro *Romea*, con asistencia del Dr. Zamenhof y la mayor parte de los congresistas, algunos con trajes nacionales. Se hizo música, y el Sr. Urbes dijo un monólogo en esperanto del Sr. Pujulá. Todo fué aplaudidísimo.

Mardon

Komencas la kunsidoj en la Universitato.

Je la deka matena horo, S-ro Zamenhof akompanita de S-roj generalo Sébert, Mibs, Pujulá, kaj aliaj kongresistoj, vizitis en lia oficejo al Barono de Bonet, ĝia rektoro. Inter la vizitato kaj la vizitantoj interŝanĝiĝis ĝentilaj frazoj.

Post, Doktoro, kaj lia sekvantaro eniris en la precipan palacsalonon, kie jam estis multe da geesperantistoj, kaj Doktoro malfermis la kunsidon.

S-ro Mudie prezidanto de «Universala Esperanta Asocio» salutis la esperantistaron, kaj kuraĝis ilin, por ke ili daŭrigu la propagandan agon.

S-ro Hadler, direktoro de la gazeto «Esperanto» per vasta parolado lernis la sciadon, rilate al la lingvo esperanto.

Oni legis telegramojn responde de Liaj Moŝtoj Reĝo kaj Ministraro.

Salutita per grandaj aplaŭdoj stariĝis Doktoro Zamenhof, kiu salutis la anojn de U. E. A., kaj diris, ke ĝi estas nun la plej grava institucio de l'esperantismo, kaj ke ĝi estas, tiu, kiu organizis la esperantistojn.

Kiam li finis lian paroladon, per tri daŭrigitaj, bruegaj aplaŭdoj, oni salutis lin.

S-ro Ronssea faris paroladon pri nia lingvo.

Oni faris la disdonon de diplomoj al la esperantistoj ekzamenitaj kaj aprobitaj por profesoroj.

S-ro Privat parolis pri vivantaj lingvoj, rilate kun Zamenhofa lingvo.

Je la unua horo disigis la esperantistoj.

Matene kaj vespere okazis ankaŭ kunvenoj de farmaciistoj, de leĝistoj kaj de medicistoj. Tiu ĉi estis prezidita de Doktoro Zamenhof kaj decidis, ke de nun la notinda gazeto «Voĉo de Kuracistoj» difinu du paĝojn por la «Kuracista Asocio».

Aliaj geesperantistoj vizitis kelkajn medicistajn klinikojn, la urbestrejon, la Diputaciejon, la arĥivon de la Aragon'a

Martes

Empiezan las reuniones en la Universidad.

A las diez de la mañana, el Sr. Zamenhof, acompañado de los señores general Sébert, Mibs, Pujulá y otros congresistas, visitaron en su despacho al Rector Barón de Bonet. Entre el visitado y los visitantes se cambiaron atentas frases.

Después el doctor y su séquito entraron en el salón principal del Palacio, donde ya había muchos esperantistas, y el doctor abrió la sesión.

El Sr. Mudie, presidente de la «Asociación Universal de Esperanto», saludó á los esperantistas y los animó para que continuaran la acción propagadora.

El Sr. Hadler, director del periódico «Esperanto», en extenso discurso, estudió las ciencias con relación al esperanto.

Se leyeron telegramas de contestación de S. M. el Rey y del Ministerio.

Saludado por grandes aplausos se levantó el Dr. Zamenhof, que saludó á los socios de U. E. A., y dijo que esta es ahora la más importante institución del esperantismo y que es la que ha organizado á los esperantistas.

Cuando acabó su discurso, por tres continuados estruendosos aplausos, fué saludado.

El Sr. Ronssea hizo un discurso referente á nuestro idioma.

Se hizo la distribución de diplomas á los esperantistas examinados y aprobados para profesores.

El Sr. Privat habló de lenguas vivas, con relación á la lengua de Zamenhof.

A la una se separaron los esperantistas.

Por la mañana y por la tarde se verificaron también reuniones de farmacéuticos, de abogados y de médicos. Esta fué presidida por el Dr. Zamenhof y decidió que desde ahora la notable revista «Voz de los Médicos», dedique dos páginas para la Asociación de Médicos.

Otros esperantistas visitaron algunas clínicas de médicos, la casa Ayuntamiento, la de la Diputación, el Archivo de la

Krono, la Muzeon de Sanktino Gadea, la Katedralan Preĝejon, kaj aliajn vidindaĵojn. Aliaj faris ekspedon al la proksima pentrinda vilaĝo Sitges'o.

Unu el la plej bonaj aktoj de la kongreso estis la koncerto, kiu okazis en la Palaco de Belaj Artoj. La fama organo estis bonege ludita de S-ro Daniel, kiu atingis multajn aplaŭdojn, same kiel la ĥoroj. La Salono estis lumigita kaj eksterordinara estis la ĉeestantaro.

Merkredon

Matene, je la deka kaj tri kvaronoj, sub la direktado de Lia Moŝto S-ro franca Generalo Priou, okazis en la Parko eksperimentoj de la «Ruĝa Kruco» dum kiuj, oni nur uzis la esperantan lingvon.

Ĉeestis ankaŭ, plie, S-ro Priou, D-ro Zamenhof kun sia aminda edzino, la delegito de la «Ruĝa Kruco» en la Katalunaj provincoj, S-ro Montaner, la Regiona Prezidantino S-ino Rozo Alier, la Vicprezidantino vidvino Sanz, la Sekretariino S-ino Estansen kaj multenombrega publiko, la plimulto esperantista.

Tagmeze, kongresistoj eniris en placeton, kie staras statuo de fama katalunjano poeto Aribaŭ, kiu antaŭdiris lingvon, kiu fratigus ĉiujn popolojn.

Tie S-ro Pujulá parolis esperante kaj katalane, pri esperantista devo tributi rememoron al defendinto de lingvo internacia, kaj Doktoro Zamenhof laŭdis la Barcelonan diveniston.

Surskribita metala tabulo, kie oni legas *La esperantistoj dum la V.ª Kongreso al Ariban, Barcelono 1909*, estis maltegita, per rekuro de esperantista flago, kiu ĝin tegis.

Dankis en la nomo de la urbo, la vicurbestro S-ro Puig.

S-inoj de Zamenhof, de Pujulá, kaj de Sebert demetis grandajn bukedojn sur la monumenton.

La publiko aklamis sinjoron Zamenhof.

La «Floraj Ludoj» estis ĉarmanta festo. La granda salono de «La Borso»

Corona de Aragón, el Museo de Santa Gadea, la iglesia Catedral y otras cosas dignas de verse. Otros hicieron una expedición á la pintoresca villa de Sitges.

Uno de los mejores actos del Congreso fué el concierto que tuvo lugar en el Palacio de Bellas Artes. El famoso órgano fué tocado por el Sr. Daniel, que obtuvo muchos aplausos, como también los coros. El salón estaba iluminadísimo y era extraordinaria la concurrencia.

Miércoles

Por la mañana, á las diez y tres cuartos, bajo la dirección del excelentísimo señor general francés Mr. Prion, se hicieron en el Parque experimentos de la «Cruz Roja», durante los cuales sólo se hizo uso del Esperanto.

Estuvieron, además del Sr. Priou, el Doctor Zamenhof con su apreciable esposa, el delegado de la «Cruz Roja» en las provincias catalanas Sr. Montaner, la Presidenta Regional Sra. Rosa Alier, la vicepresidenta Sra. Sanz, la secretaria Sra. Estansen y numeroso público, en su mayoría esperantistas.

Al mediodía los Congresistas fueron á la placeta donde está la estatua del famoso poeta catalán Aribau, que predijo una lengua que fraternizaría todos los pueblos.

Allí el Sr. Pujulá habló en Esperanto y catalán del deber esperantista de tributar un recuerdo al defensor de una lengua internacional, y el doctor Zamenhof elogió al vate de Barcelona.

Inscripta placa de metal donde se lee (traducido al castellano): *Los esperantistas durante el V Congreso á Aribau, Barcelona 1909*, fué descubierta, descorriendose una bandera esperantista que la cubría.

Dió gracias en nombre de la ciudad, el teniente alcalde Sr. Puig.

Las Sras. de Zamenhof, de Pujulá y de Sébert depositaron grandes ramos de flores sobre el monumento.

El público aclamó al Sr. Zamenhof.

Los «Juegos Florales» fueron una fiesta encantadora. El gran salón de la «Bol-

estis ornamita per tapiŝoj kaj prezentis bonegan aspekton.

Meze, trono atendis la Reĝinon de la Festo.

Je la kvara vespera horo, kaj ludante marŝon la urba muzikistaro, eniris en la salonon doktoro Zamenhof akompanata de la prezidanto de la Floraj Ludoj S-ro Bourlet, de S-ro Pujulá, kaj aliaj esperantistoj. S-ino de Zamenhof, Rebours kaj aliaj okupis preferajn lokojn. En tiuj difinitaj por aŭtoritatoj estis la urbestro kaj kelkaj urbkonsilantoj, la Prezidanto de la Provinca Deputataro, kaj aliaj Sinjoroj. La salono estis plenigegita.

Sinjoro Urbestro anoncis, ke la festo estas komencata.

S-ro Bourlet faris bonegan paroladon, kiu estis kelkaj fojoj interrompita per entuziasmaj ovacioj.

S-ro Boirac sekretario, de la Ludoj, legis la premiitajn verkojn.

Trafis la *Bukedon de naturaj floroj*, Dresdena fraŭlino Mario Hankel, verkistino de kelkaj libroj germane kaj esperante skribitaj.

Kiam S-ro Rektoro Boirac legis ŝian nomon, deliranta ovacio estis al ŝi farita de ĉiuj la ĉeestantoj, piede. Li donis ŝin lian brakon, urba muzikistaro ludis marŝon, kvar urbogardistojn, para de vestitaj iris post la paro, kaj fraulino Hankel, Jam Reĝino de la Festo, okupis la tronon,

Tuj S-ro Chavet legis ŝian poezion. jen.

sa» estaba adornado con tapices y presentaba un magnífico aspecto.

En medio, un trono esperaba á la Reina de la Fiesta.

A las cuatro de la tarde y tocando una marcha la música del Ayuntamiento, entraron en el salón el doctor Zamenhof acompañado del presidente de los Juegos Florales Sr. Bourlet, del Sr. Pujulá y de otros esperantistas. La Sra. de Zamenhof Rebours y otras, ocuparon lugares preferentes. En los destinados para autoridades estaban el alcalde y algunos consejeros, el presidente de la Diputación Provincial y otros señores. El salón rebosaba.

El señor alcalde anunció que la fiesta estaba comenzada.

El Sr. Bourlet hizo un magnífico discurso, que fué algunas veces interrumpido por entusiastas ovaciones.

El Sr. Boirac, secretario de los Juegos leyó las obras premiadas.

Alcanzó el *Ramo de flores naturales* la Srta. de Dresden María Haukel, compositora de algunos libros en alemán y en esperanto.

Cuando el Sr. Rector Boirac leyó el nombre de ella, los asistentes, en pie, la hicieron una delirante ovación. Él la dió el brazo, la música del ayuntamiento tocó una marcha, cuatro municipales de gala fueron detrás de la pareja, y la señorita Haukel, ya Reina de la Fiesta, ocupó el trono.

En seguida el Sr. Chavet leyó la poesía de ella. Hela aquí:

LA SIMBOLO DE L' AMO

(El símbolo del Amor)

Rozujo sovaĝa, simbolo de l'amo,
En vintro vi staras sen ia ornamo!
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.

—

Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas:
«Silentu, silentu, mi dormon bezonas:
»Min nutras denove patrino la tero,
»Pacience atendas mi ĝis la somero.

—

Dormantan rozujon printempo vekigis
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.
Ho, donu al mi nun kroneton belfloran,
Girlandon balancan kaj brilekoloran!

—

«Ne tuŝu; ne ŝiru floraron, la mian,
»Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,
»Pro amo mi miajn floretojn defendos,
»Pro amo mi miajn pikilojn forsendos.

—

Al vento ĝi florofoliojn oferis,
Aŭtune la fruktoj fiere aperis:
Rozujo simbolo de l'amo vi restas,
Pacienca, alloga, kuraĝa vi estas.

Poste S-ro Bline el Polonio, legis paroladon de S-ro Grawouski, de Varsovio.

Ceteraj premioj estis disdonitaj.
La gajnantoj, kiuj ĉeestis, estis S-roj Privat, Bickell, Chavet, Laveri, Clerement, Rogensson, Vanschou, Bousson, Bria, Dalmau kaj Inglada, tiuj du lastaj, hispanaj.

Nia premio estis gajnita de S-ro Rudolf Sprolte, norvego.
Inter la aliaj premiitoj, estis kelkaj fraŭlinoj.
Post la disdono de premioj S-ro Bourlet faris mallongan paroladon, kiu finiĝis per Vivu esperanto! ripetegita. S-ro urbestro diris: *La festo estas fermita.* Urba muzikistaro ludis himnon «La Espero» kaj samtempe kongresanoj ĝin kantis.

Longe daŭris la foriro, kaj kiam nia kara majstro eliris el la «Borso», estis entuziasme ovaciita.
Vespere, en la teatro «El Bosque» (La Bosko), por honori la esperantistoj, oni kantis *Lohengrin*, esperante la kantparolon de kavaliro Gral, kaj «Akcepto».
Oni dancis la baleton «Studento Parigini» kaj finiĝis la prezentado per alegorio de esperanto.
La partero estis ornamita per esperantistaj flagoj. Estis multe da kongresistoj kaj ĉio estis tre aplaŭdita.
Ankaŭ vespere S-ro Luis Carlos faris interesan paroladon en la Ateneo, pri la neceso de helpa lingvo inter la oficistaro de la tutmonda presistaro. Li estis tre aplaŭdita de la ĉeestantoj kongresanoj.

Jaŭdon

Matene, kvarono de deka horo, komencis en la Universitato la kunsidoj de la Lingva Komitato, kiuj rezultis tre interesaj.
Je la deka horo, en alia salono oni decidis prezenti, skribe, proponon pri tio, ke la delegitoj de esperantistaj Societoj havu juĝan personecon antaŭ la naciaj Registaroj.
Posttagmeze oni faris ekskursojn, per

Después el Sr. Bline de Polonia leyó un discurso del Sr. Grawouski de Varsovia.
Fueron repartidos los demás premios.
Los agraciados que estaban presentes eran los Sres. Privat, Bickell, Chavet, Laveri, Clerement, Rogensson, Vanschou, Bousson, Bría, Dalmau é Inglada, estos dos últimos, españoles.
Nuestro premio lo ganó el Sr. Rudolf Sprolte, noruego.
Entre los otros premiados hubo algunas señoritas.
Después de distribuídos los premios, el Sr. Bourlet hizo un corto discurso que terminó con un ¡Viva el esperanto!, extraordinariamente repetido. El Sr. Alcalde dijo en esperanto: *La fiesta ha terminado.* La música del Ayuntamiento tocó el himno «La Espero» y al mismo tiempo lo cantaron los congresistas.
El desfile duró mucho, y cuando nuestro querido maestro salió de la «Bolsa», fué ovacionado con entusiasmo.
Por la noche, en el teatro «El Bosque», en honor de los esperantistas se cantó *Lohengrin,* en esperanto el recitado del caballero Gral, y «Akcepto».
Se bailó «El estudiante Parigini» y terminó la representación por una alegoría del esperanto.
El patio estaba adornado con banderas esperantistas. Había muchos congresistas, y todo fué muy aplaudido.
También por la noche el Sr. Luis Carlos hizo un interesante discurso en el Ateneo, referente á la necesidad de una lengua auxiliar entre el personal de la imprenta mundial. Fué muy aplaudido.

Jueves

Por la mañana, á las nueve y tres cuartos, empezaron en la Universidad las reuniones del Comité de la Lengua, que resultaron muy interesantes.
A las diez, en otro salón, se decidió presentar, por escrito, una proposición para que los delegados de Sociedades esperantistas tengan personalidad jurídica ante los Gobiernos de las naciones.
Por la tarde se hicieron excursiones,

tramvojoj, al monto Tibidabo kaj al vilaĝo Vallvidrero.

Je la kvina horo vespere, kunvenis en Kontinentala Kafejo la komercistoj, kaj je la naŭa horo en Farmacia Kolegio, la farmaciistoj.

En la teatro Romea oni prezentadis la dramon «Mistero de Doloro» esperante tradukitan.

La esperantistaj aktoroj, la verkisto, kaj la tradukinto, tiel kiel Doktoro Zamenhof, kiu alestis al la teatro, estis tre aplaŭditaj de la multenombra publiko, kiu ĝin plenis.

La urbestraro voĉdonis kvin mil pesetojn por adiaŭi la kongresanojn.

Vendredon

Matene, «Lingva Komitato» kaj «Esperanta Universala Asocio» denove havis kunsidon en la Universitato, kaj ankaŭ la «Fervojistoj», Katolika Unuigo» kaj la «Internacia Asocio de Majstroj», kiu estis prezidita de S-ino Chelmot, kun ĉeesto de pli ol cent geanoj.

Posttagmeze okazis en la «Parko» la kuradoj de motocikletoj kaj bicikletoj.

La ĉeestantaro estis eksterordinara, kaj Doktoro Zamenhof okupis lokon inter la juĝantaro, tiel kiel sia edzino, tiu de S-ro Pujalá kaj multaj esperantistoj.

Motocikletoj kuris kaj gajnis la premion S-ro Aparg.

La kurantoj de bicikletoj sin disputis la «Pokalon Esperanto», ili estis sep, kaj gajnis S-ro Magdalena la pokalon, kaj Sinjoroj Borrás, Quirante kaj Barnola, la duan, trian kaj kvaronan premiojn.

La venkintoj estis ovaciitaj.

Vespere, je la sepa kaj kvarono, S-ro Zamenhof akompanita de gesinjoroj Pujulá, de S-ro Mann kaj de aliaj distingindaj kongresanoj vizitis la «Katalanan Vegetarianan Ligon». Li estis salutata de doktoroj Falp kaj Pallejá, kiuj lin sciigis, ke li estis nomita societano de ilia Asocio.

Fraŭlino Eliso Gallinat ludis bonege la «Himnon Vegetarianon» kaj aliajn

por tranvías, al monte Tibidabo y á la villa de Vallvidrera.

A las cinco de la tarde se reunieron en el Café Continental los comerciantes, y á las nueve en el Colegio Farmacéutico los farmacéuticos.

En el teatro de Romea se representó el drama «Misterio de Dolores» traducido al esperanto.

Los actores esperantistas, el autor y el traductor, así como el Doctor Zamenhof, que asistió al teatro, fueron muy aplaudidos del numeroso público que lo llenaba.

El Ayuntamiento votó cinco mil pesetas para despedir á los congresistas.

Viernes

Por la mañana, el «Comité de la Lengua» y la «Asociación Universal de Esperanto» tuvo una nueva reunión en la Universidad, y también los «Empleados de Ferrocarriles», «La Unión Católica» y la «Asociación Internacional de Maestros», que fué presidida por la Sra. Chelmot, con asistencia de más de cien socios de ambos sexos.

Por la tarde tuvo lugar en el «Parque» las carreras de motocicletas y bicicletas.

La concurrencia fué extraordinaria, y el Doctor Zamenhof ocupó un sitio en el Jurado, así como su esposa, la del señor Pujulá y muchos esperantistas.

Corrieron las motocicletas y ganó el premio el Sr. Aparg.

Los corredores de bicicletas se disputaron la «Copa Esperanto», fueron siete, y ganó el Sr. Magdalena la Copa, y los Sres. Borrás, Quirante y Barnola, el segundo, tercero y cuarto premios.

Los vencedores fueron ovacionados.

Por la tarde, á las siete y cuarto, el Sr. Zamenhof acompañado de los señores de Pujulá, del Sr. Mann y de otros distinguidos congresistas, visitaron la «Liga Vegetariana Catalana». Fué saludado por los doctores Falp y Pallejá, que le manifestaron que había sido nombrado miembro de la Asociación.

La Srta. Elisa Gallinat tocó magnificamente el «Himno Vegetariano» y otras

muzikaĵojn, kaj S-roj Falp, Mann kaj Zamenhof laŭdis vegetarismon.

Antaŭ la disiĝo, ĉiuj la ĉeestantoj gustumis bongustan fruktan vespermanĝeton.

Belega internacia balon okazis en la Palaco de Belaj Artoj.

Oni dancis «La Rondon» kiu tre plaĉis kaj katalunjajn dancojn.

Multaj el la fremdaj kongresistoj alestis kun iliaj naciaj kostumoj. La autoritatoj honoris la feston, kaj ankaŭ doktoro Zamenhof, kiu estis ovaciita.

piezas de música, y los Sres. Falp, Mann y Zamenhof, alabaron el vegetarismo.

Antes de la disolución, todos los presentes saborearon una gustosa merienda de frutas.

Magnífico baile internacional se verificó en el Palacio de Bellas Artes.

Se bailó «La Rondo» que gustó mucho y bailes catalanes.

Muchos de los congresistas extranjeros asistieron con sus trajes nacionales. Las autoridades honraron la fiesta y también el Doctor Zamenhof, que fué ovacionado.

Sabaton

Matene kuniĝis en la Universitato la «Esperantistaj Fakoj» de Vegetarianoj, Publicistoj, Scienculoj, Stenografiistoj, Stataj Oficistoj, Ruĝa Kruco kaj aliaj, pritraktante ĉiuj pri siaj internaj aferoj.

Je la deka kaj duona horo estis ĝenerala kunsido, sub la prezido de D-ro Zamenhof, kaj oni decidis nomi po unu el mil esperantistoj de ĉiu lando, por zorgi la financan parton de la ĝeneralaj Societoj el diversaj landoj.

En la Palaco de Belaj Artoj, je la kvara horo, S-ro Pujulá malfermis la «Ferman Kunsidon» ĉeestante D-ro Zamenhof kaj preskaŭ ĉiuj la kongresanoj.

S-ro Chavet, ĝenerala Sekretario, legis la aktojn de la antaŭaj kongresoj, kiuj estis aprobitaj. Li sciigas, ke la numero de kongresistoj estas proksimume mil-tricent.

D-ro Dor proponis, ke oni petu por D-ro Zamenhof la premion Nobel.

D-ro Zamenhof petas, ke tian proponon ne sukcesu.

S-ro Keating sciigas, ke laŭ letero, kiu li ĵus ricevis de Rio Janeiro, la sesa Kongreso de Kuracistoj, kiu ĵus okazis en tiu urbo akceptis esperanton, kiel unu el la oficialaj lingvoj kaj dankas la barcelonanojn, pro la ĝentilaĵojn je la fremdaj esperantistoj.

La Sekretario de «Scienca Asocio»

Sábado

Por la mañana se reunieron en la Universidad las Secciones Esperantistas de Vegetarianos, Publicistas, Sabios, Taquígrafos, Empleados del Estado, Cruz Roja y otras, tratando todos de sus especiales asuntos.

A las diez y media hubo una sesión general, bajo la presidencia del doctor Zamenhof, y se decidió nombrar uno por cada mil esperantistas de cada país, para cuidar de la parte financiera de las Sociedades generales de los diversos países.

En el Palacio de Bellas Artes, á las cuatro, el Sr. Pujulá abrió la «Sesión de Clausura», hallándose presente el doctor Zamenhof y casi todos los Congresistas.

El Sr. Chavet, Secretario general, leyó las actas de los anteriores Congresos, que fueron aprobados. Manifestó que el número de Congresistas era aproximadamente de mil trescientos.

El Dr. Dor propuso que se pidiera para el Dr. Zamenhof el premio Nobel.

El Dr. Zamenhof pide que tal proposición no prospere.

El Sr. Keating manifiesta que, por carta que acaba de recibir de Río Janeiro, el sexto Congreso de Médicos, que acaba de verificarse en aquella ciudad, ha adoptado el esperanto como una de las lenguas oficiales y da gracias á los barceloneses por sus atenciones con los extranjeros esperantistas.

El Secretario de la «Asociación Cien-

sciigas, ke ĝiaj decidoj estos publikitaj en la protokolo de Kongreso.

S-ro Allende proponas, ke oni petu al la Registaro, ke oni instruu esperanton en la lernejoj. S-ro Bremon kredas, ke tion devas esti interesita al riprezentantoj de la Nacio por ĝia peto, kaj S-ro Prezidanto diras, ke oni ne povas diskuti pri tio, ĉar oni ne prezentis ĵustatempe la proponon.

S-ro Sekretario legis telegramon de S-ro Steffeief, kiu ne povis alveni al la Kongreso, kaj deziras ĝian sukceson; nomaron de la propozicioj aprobitaj de la Kongreso kaj sciigo, ke estas tridek tri la nacioj riprezentitaj en la Kongreso.

S-ino Rebours petas aplaŭdon por la urbaj gvardianoj, sciantaj esperanton, kaj diras je la nomo de la urbagvardiestro ke ĉiuj la gvardianoj lernos esperanton.

S-ro Bourlet dankas la komitaton pro la granda sukceso atingita.

S-ro Pujulá respondas ke la alvenintoj sukcesigis la Kongreson kaj dankas la autoritatojn pro la helpo donita al ĝi.

Doktoro Zamenhof dankas al ĉiuj, kaj finigas la Kongreson.

Vivu'oj al esperanto kaj al Zamenhof, kaj kanto de «La Espero», kronis nian memorindan V.an Kongreson.

La VI.a okazos en Washington kaj la VII.a en Antverpeno.

La Urbestraro akceptis adiaŭdire la esperantistoj. Ili alkuris preskaŭ ĉiuj al la Palaco de Belaj Artoj, belege ornamita per floroj kaj kreskaĵoj. Tie estis la urbestro kaj kelkaj urbkonsilantoj, kaj post ĝentilaj reciprokaj salutoj, oni konsumis delicatan *lunĉon*, dum la elektraj organoj ludis belajn muzikaĵojn.

Alestis ankaŭ al la festo, liaj moŝtoj sinjoroj Kapitano Generalo, Provincesto, Prezidanto de la Provinca Diputacio kaj aliaj aŭtoritatoj.

Kiam la festo finiĝis, himno «La Espero» estis kantata, kaj Doktoro Zamenhof kaj ni, ĉiuj dankegaj al la gastema Barcelono kaj kontentegaj pro la sukcesego de la Kvina, komencis senti la ĉagrenon de la necesa disiĝo.

tífica» manifiesta que las decisiones serán publicadas en el protocolo del Congreso.

El Sr. Allende propone que se pida al Gobierno que se enseñe el esperanto en las escuelas. El Sr. Bremón cree que eso debe ser procurado de los representantes de la Nación para que lo pidan, y el señor Presidente dice que no se puede discutir respecto á eso, porque no se ha presentado á tiempo la proposición.

El Sr. Secretario leyó un telegrama del Sr. Steffeief, que no pudo venir al Congreso y desea su éxito; relación de las proposiciones aprobadas por el Congreso y noticia de que son treinta y tres las naciones representadas en el Congreso.

La Sra. Rebours pide un aplauso para los municipales que saben esperanto, y dice en nombre del jefe de ellos que todos aprenderán el esperanto.

El Sr. Bourlet da gracias al Comité por el gran auxilio alcanzado.

El Sr. Pujulá contesta que los que han venido han ocasionado el éxito del Congreso y da las gracias á las autoridades por el auxilio que le han prestado.

El Doctor Zamenhof da á todos las gracias, y concluye el Congreso.

Vivas al esperanto y á Zamenhof y canto de «La Espero» coronó nuestro memorable V.° Congreso.

El VI,° tendrá lugar en Washington y el VII.° en Amberes.

El Ayuntamiento despidió con una reunión á los esperantistas. Concurrieron casi todos al Palacio de Bellas Artes, hermosamente adornado con flores y plantas. Allí estaban el Alcalde y algunos concejales, y después de atentos recíprocos saludos, se tomó un delicado *lunch*, mientras los órganos eléctricos tocaban bellas piezas.

Asistieron también á la fiesta los excelentísimos señores Capitán general, Gobernador civil, Presidente de la Diputación provincial y otras autoridades.

Cuando terminó la fiesta, fué cantado el himno «La Espero», y el Doctor Zamenhof y todos nosotros, agradecidísimo á la hospitalaria Barcelona y contentísimos por el exitazo del Quinto Congreso, empezamos á sentir pena por la necesaria separación.

La organiza Komitato donacis al Doktoro insignion de la kvina Kongreso, farita el delikataj metaloj ornamita per emaljaĵo kaj brilantoj. Ĝi estas granvalora artaĵo. Kaj la lernantoj de la Industria Lernejo de Teksaĵoj de Sabadello'o, lian portreton silkteksitan.

El Comité organizador regaló al doctor la insignia del quinto Congreso, hecha de metales preciosos y adornada por esmalte y brillantes. Es un objeto artístico de gran valor. Y los alumnos de la Escuela Industrial de Tejidos de Sabadell, su retrato tejido en sedas.

Memorindaj datrevenoj de Oktobro

1.—1684. Mortas la mondfama franca poeto kaj tragedia aŭtoro Petro Corneille.
2.—1898. Socialista Kongreso en Stuttgart.
3—1568. Mortas Isabelo de Valois, tria edzino de Felipo II de Hispanujo.
4—1182. Naskiĝas Sankta Francisko de Asis.
5.—1890. Oni malfermas la Katolikan Kongreson de Zaragozo (Hispanujo).
6.—1892. Mortas la angla poeto Tennyson.
7.—1571. Memorinda ŝipa bataio de Lepanto.
8.—1881. Inauguracio de la fervojo de Cáceres (Hispanujo) al Portugalujo.
9.—1547. Estas baptita en Alcalá de Henares la mondfama aŭtoro de la «Kiĥoto», Miĥaelo Cervantes de Saavedra.
10.—1830. Naskiĝas la hispana reĝino Isabelo II.
11.—1627. Mortas la fama hispana poeto Bernardo de Balbuena.
12.—1492. Kristoforo Kolombo eltrovas Amerikon.
13.—1873. Mortas en Madrido la glora hispana poeto Manuelo Bretón de los Herreros.
14.—1803. Naskiĝas la franca verkisto Prospero Merimée.
15.—1582. Mortas la fama hispana poetino Sankta Terezo de Jesuo.
16.—1793. Estas gilotinmortata la franca reĝino Mario Antonieto.
17.—1760. Naskiĝas Saint Simon, fama socialisto franca.
18.—1892. Inaŭguracio de la telefono inter Novjorko kaj Ĉikago.
19.—1735. Naskiĝas en Braintree (Massachussetts) Johano Adams, presidento de Usono.
20.—1820. Mortas la fama hispana historiisto Josef Antonio Conde.
21.—1790. Naskiĝas en Maçon la famkonata poeto Alfonso de Lamartine.
22.—1613. Mortas la fama satira poeto Regnier.
23.—1872. Mortas la fama franca literaturisto Teófilo Gautier.
24.—1905. Parado en Carabanchel (Madrido) ĉeestante la franca presidento S-ro Loubet.
25.—1878. Oliva atencas kontraŭ la reĝo Alfonso XII.
26.—7852. Mortas en Parizo la fama filosofo kaj literaturisto Vicente Gioberti.
27.—1840. Mortas en Nizo la mondfama violonludisto Nikolao Paganini.
28.—1893. La hispana generalo Margallo mortas sur la batalkampo de Meliljo.
29.—1808. Eliras el Parizo al Hispanujo la imperiestro Napoleono.
30—1762. Naskiĝas en Konstantinoplo Andreo Chenier, lirica poeto franca.
31.—1783. Naskiĝas en Florenco J. B. Niccolini, dramaŭtoro.

Kolektis kaj tradukis.
ESPERANTISTO 17.206

Solvo de la Spritludoj

presitaj en la Septembra numero

DE LA **AKROSTIKO** EL «BELA PENSO PRI ESPERANTO»

1.—	JU PLI	F	RUE
2.—	DES PLI	F	RUE
3 —	INTE	R	NACIA
4 —	ESPE	R	ANTO
5. —	L	A	
6. —	L	A	
7.—		T	RA
8. —		T	UTA
9 —	F	E	LICA
10.—	D	E	
11.—	FRATE	C	O
12.—	NA	C	IOJ
13.—	LINGV	O	
14.—	MOND	O	

JU PLI FRUE	DISVASTIĜOS	LA		
1		5		
INTERNACIA	LINGVO	ESPERAN-		
3	13	4		
TO	TRA	LA	TUTA	MONDO
	7		8	14
DES PLI FRUE	SEKVOS	LA	FE-	
2		6		
LIĈA	FRATECO	DE	LA	NACIOJ
9	11	10		12

Ju pli frue divastiĝos la internacia lingvo Esperanto tra la tuta mondo, des pli frue sekvos la feliĉa frateco de la nacioj.

Solvintoj de la Spritludoj publikigitaj en la Aŭgusta numero

De la *Kongresa Spritludo:* F-inoj Josefino Estopiñá kaj Mario Balanzá, de Valencio; S-ro Andres Pernas Pérez, de Villalba (Lugo) Hispanujo; S-ro Julien Herla, de Verviers (Belguĵo); S-ro Eduardo Tomás Pla, de Valencio (Hispanujo).

PENSO

Virinbeleco estas rekomenda karto nur dum mallonga limtempo.—(*Ninón de Lenclós.)*

★

ANEKDOTO

Saĝa respondo.

La regadon de Kristenino de Svedujo oni pricitas pro ĝia prudenteco, kiu konservadis la pacon de la reĝlando.

Kristenino neniam volis edziniĝi, kaj al la ripetitaj petegdemandoj de la ŝtatoj ŝi ĉiam respondis:

—Mi preferas nomi bonan princon aŭ posteulon, kiu estu kapabla regi kun gloro.—Ne devigu min edziniĝi ĉar same povus naskiĝi el ni unu *Neron'o* ol unu *Aŭgusto.*

★

SPRITAĴO

Bedaŭro.

—Ĉu la notario ĉeestas hejme? Mi bezonas paroli kun li.

—Nu... ĉu vi ne scias kio okazis? Hieraŭ, aŭtomobilo surpremis kaj dispecigis lin sur la strato.

—Ho, Dio!... Kiel malfeliĉa mi estas!

Tipografía Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.